"Ĉe Esperanto la libro estas la primara afero, la komenco de ĉio. Libroj estas niaj obeliskoj kaj piramidoj... nia ĉio. Sen libroj ni ne estus travivintaj la unuan jarcenton de nia historio. Sen libroj eĉ nun malfacilus pruvi nian ekziston kaj gravecon. Libro estas la esenco, la spino mem de la Esperanto movado kaj de la Internacia Lingvo."

Bela estas ĉi tiu konata citaĵo, ĉi tiu laŭdo al la libro Esperanta. Do, kiom da libroj posedas Esperanta kulturo?

En la dokumento sub la titolo "Petogodiŝnja akciana orijentacijo jugoslavenskog esperantskog pokreta" (la dokumenton faris Slovenia Esperanto-Ligo antaŭ la 21-a kongreso de jugoslaviaj esperantistoj, okazinta de 25.ĝis 27.11.1983 en Škofja Loka) sur la paĝo 2 oni povas legi:

..."u organiziranom pokretu u 84 zemlje djeluje nekoliko milijuna članova, pokret raspolaže sa više od 150 stručnih rječnika, preko 40.000 naslova knjiga, preko 100 revija i časopisa"...

### *Certe la plej granda?*

En "Tempo" 2/83 sur la paĝo 19 estas skribita ke en la kadro de la Universitata biblioteko en La Chaux-de-Fonds (Svislando) ekzistas interlingvistika sekcio enhavanta la plej grandan numeron da bibliografiaj unuoj en la mondo el tiu kampo. Tie troviĝas preskaŭ 40.000 libroj kaj revuoj, ĉiuj plej gravaj verkoj el la sfero de internaciaj lingvoj, el kiuj pli ol 99 procentoj koncernas Esperanton. Tio estas certe la plej granda kaj la plej valora biblioteko tiaspeca en la mondo.

"Esperanto, udžbenik međunarodnog jezika, lernolibro de la Internacia Lingvo, IKS, Zagreb, 1982" sur la paĝo 39 de la kvara eldono sciigas ke "bogat svijet esperantske knjige broji oko 40.000 prevedenih i originalnih naslova". La kvina eldono de la sama lernolibro la sekvantan jaron (tio estas en la jaro 1983.) sur la paĝo 43 donas ĉi tiun informon: "bogat svijet esperantske knjige broji oko 50.000 prevedenih i originalnih naslova". En la sesa



eldono (prilaborita), tio estas en la eldono de la jaro 1984. sur la paĝo 43 oni ripetas la formuligon kaj la ciferon el la kvina eldono "bogat svijet esperantske knjige broji oko 50.000 naslova..".

## En unu jaro 10.000 titoloj?

Ĉu kredeblas ke en unu sola jaro la Esperanta literaturo kreskis je la tutaj 10.000 novaj titoloj? Aŭ ĉu eble iu el tiuj ciferoj ne estas ĝusta? Kiu cifero? Kiom, do, ververe, libroj ekzistas?

Ni probu konzulti famkonatan libron "Esperanto en perspektivo", tiun monumentan volumon "la plej bonan kaj la plejinformriĉan libron iam ajn verkitan pri la Internacia Lingvo", la "fonton de fidindaj kaj detalaj informoj", la "enciklopedian gvidilon pri Esperanto". La libron eldonis UEA (CED) en la jaro 1974., do antaŭ dek jaroj, sed tamen ni rigardu instruhavajn faktojn.

## Fidindaj fontoj

Sur la paĝo 47 oni povas legi: "En 1912 la librokvanto estis 1.989 titoloj. Inter 1961 kaj 1969 aperis 416 verkoj". Do jaraveraĝe - 52 libroj. Sur la paĝoj 679 kaj 680 oni troviĝas ĉi tiuj faktoj: Biblioteko BEA (Brita Esperanto Asocio) havas proksimume 33.000 registritaj titoloj, Biblioteko IEMW 14.000 volumoj, Biblioteko Hodler (UEA) ĉirkaŭ 10.000 volumoj. En La Chaux-de-Fonds troviĝas proksimume 1.000 titoloj.

Komparu tiujn ciferojn kun tio kion diras unu flugfolio de KEL (Kroatia Esperanto-Ligo) el la jaro 1982: "Do danas je na esperantu objavljena ogromna biblioteka od preko 40.000 raznih naslova literature, znanstvenih i stručnih knjiga od čega je trećina napisana izvorno, a ostalo prevedeno s najrazličitijih jezika svijeta".

Laŭ tiu komparo oni vidas grandan kreskon en la lastaj dek jaroj, sed... Sur la paĝo 304 de la Katalogo 1980/82 de Libroservo de UEA oni povas legi: "du aŭ tri novaj libroj aperas ĉiusemajne", kaj tio signifas ĉirkaŭ 150 novaj libroj ĉiujare. En dek jaroj, do, nur 1.500 novaj libroj, ĉu ne? En la oficiala organo de UEA "esperanto" 1983 decembro, n-ro 936, sur la paĝo 2 oni skribas pri Esperanta libro: "Aperas tuta amaso lastatempe." Kion signifas tiu "tuta amaso" ni povas pritaksi el la fakto ke en la tuta 1983-a jaro en la rubrikoj "Laste aperis..." oni povas nombri entute 220 novaj libroj!

## Kie troviĝas eraro

Kie troviĝas eraro? Ĉar eraro devas esti ie en la metodo, aŭ en la koncepto pri tio kio estas libro. Mi ne scias kiu estas la unua lanĉinto de la nombro 40.000 libroj. Certe, tiun nombron uzas ne nur jugoslaviaj esperantistoj. Ekzemple, en la verko de Umberto Stoppoloni "Introduzione alla conoscenza dell'esperanto", 1983, sur la paĝo 9, oni povas legi ke: "Nelle biblioteche si raccolgono attualmente circa 40.000 opere in lingua esperanto, tradotte ed anche originali."

Sendube, oni devas bone distingi. Kio estas libro? Kio estas, verko, volumo, titolo, bibliografia unuo, broŝuro, revuo, gazeto, ekzemplero, ero, jarkolekto, bulteno? Bibliografiaj unuoj povas esti ĉiuj libroj kaj libroformaj esperantaĵoj, ĉiuj broŝuroj, ĉiuj unuopaj numeroj de periodaĵoj, prospektoj, afiŝoj, flugfolioj... Bibliografia unuo povas esti ĉiu verko, ĉiu unuopa verko, kaj la verko povas esti ĉiu unuopa ĵurnala artikolo (ĵurnalisma verko), ĉiu scienca artikolo (scienca verko senkonsidere la longecon), ĉiu beletra produkto, ĉiu romano, novelo, rakonto, poemo, eseo. Ĉu libro estas bibliografia unuo sendepende de verkoj? Ĉar libro de eseoj enhavas multajn eseojn, de multajn verkojn. Ĝi estas kolekto da eseoj. Ĉu la revuo estas unu verko aŭ kolekto da verkoj? En ĉiu okazo, la demandoj ne estas ridindaj, se ni volas malkovri kie troviĝas iu eraro. Se la nombroj ne konkordas, provu ni eltrovi ĉu en ĉiu okazo temas pri la sama afero, ĉu temas pri bibliografiaj unuoj - artikoloj, unuopaj gazetoj, bultenoj kaj aliaj periodaĵoj.

## Unuoj, eroj, volumoj, verkoj...

Tia distingo estas gravega. Jen, nur unu ekzemplo. Nun aperas en la tuta mondo 136 Esperantaj periodaĵoj (revuoj, gazetoj kaj bultenoj laŭ la Katalogo de la Libroservo de UEA). Se ni prenis ĉiuj numerojn de ĉiuj periodaĵoj ekde la Unua Libro ĝis la jaro 1984, eble oni povus elnombri 20.000 eroj. Ĉu oni povus tiun nombron enkalkuli en la sumon de 40.000 aŭ 50.000 Esperantaj libroj? Ekzemple, ĉu "Herlodo de Esperanto" estu 1736 bibliografiaj unuoj (Ĉar tiom da numeroj aperis ĝis 20 Oktobro 1984) aŭ nur 60 eroj (Ĉar tiom da jarkolektoj ekzistas ekde la jaro 1920, kiam estis fondita, ĝis la jaro 1984)? Eble jes, se oni ne akcentas libroj, sed se oni deskribas tion alimaniere, ekzemple unuoj, eroj, titoloj, verkoj, volumoj, presitaj esperantaĵoj.

Ĉi tie estus utile mencii distingon kiun faras UNESKO. Po UNESKO presita volumo enhavanta ĝis 50 paĝoj estas broŝuro, volumo kun pli ol 50 paĝoj estas libro, beletra proza verko kun pli ol 100 paĝoj estas romano...

## Kion diras la ekspertoj

Antaŭ ol ion ajn konkludi, bonvolu konsulti ankoraŭ kelkajn fontojn: "Konsultlibron pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj" de Marinko Gjivoje, "Bibliografion de Internacia Lingvo" de Petro Stojan, "SAT adresaron", "esperanton" de UEA, Edwardon Ockey, D. B. Gregor, d-ron Ivo Lapenna, Wiliamon Auld, d-ron István Szerdahelyi, Gastonon Waringhien... Ĉiuj tiuj menciitaj personoj estas sunaj, sonaj kaj sonoraj nomoj de Esperanta kulturo, famaj kaj fidindaj ekspertoj pri Esperanto, kaj ili ĉiuj multfoje skribis pri la Esperanta libro.

La granda nomo de la Esperanta literaturo, eble nun la plej granda vivanta reprezentanto de la Esperanta kulturo, Gaston Waringhien en la antaŭparolo al sia "A.B.C. d'Espéranto", Lübeck 1943 - Tours 1945, skribis: "L'Espéranto, qui a derrière lui plus de cinquante ans de pratique et une littérature de plus de 5.000 volumes, est devenu une véritable langue vivante ...".

Petro Stojan en la "Bibliografio de Internacia Lingvo", 1929, notas 6.333 bibliografiaj unuoj (libroj kaj periodaĵoj).

Edward Ockey, redaktoro de "The British Esperantist", 1967-1971 eldonis en la jaro 1971 "Leksikonon de Oficialaj Vortoj", kie li sur la paĝo 2 skribis: "Brief facts about Esperanto: 100 regularly published magazines; 10.000 books." (Mallongaj faktoj pri Esperanto: 100 regule publikitaj gazetoj; 10.000 libroj.) Ni povas kredi ke Ockey bone konis la faktojn, ĉar li rekte havis envidon en la plej ampleksan Esperantan bibliotekon, nome en la bibliotekon de BEA (Bulter).

## La nombro kreskas

D-ro Ivo Lapenna en sia libro "La Internacia Lingvo", 1954, paĝo 77, skribis jene: La nombro de la Esperantaj libroj kreskis jene: En la jaro 1889 ekzistis 29 libroj en Esperanto, 1894 - 88, 1899 - 123, 1904 - 211, 1909 - 1330, 1928 - 3.200. En la jaro 1946 la plej granda kaj la plej bone organizita Esperanto-Biblioteko en la mondo, tiu de Brita Esperantista Asocio en Londono, havis entute 28.060 registritajn publikaĵojn. En tiu ĉi cifero estas inkluzivitaj la kompletoj de 300 Esperantaj gazetoj kaj revuoj (sciencaj, literaturaj, fakaj k.a.), kiel ankaŭ diversaj lernolibroj kaj vortaroj.



D-ro Lapenna aldonas plue: "La "Bibliografio de Esperanto Eldonaĵoj", kiun faris la kunlaboranto de CED W.Auld, montras, ke inter Majo 1945 kaj la 1-a de Jan.1953 estas entute publikigitaj 558 diversaj libroj kaj broŝuroj, ne kalkulante la kompletojn de gazetoj kaj revuoj".

D.B.Gregor en "Esperanto" XI,1961, paĝo 135, publikigis ke inter I 1954 kaj V 1961 (sep jaroj kaj duono) estis eldonitaj 226 libroj (beletro 75, aktualaĵoj 66, kulturo 27, esperantologio 23, scienco 15) kun entute 27.000 paĝoj. Ĉiu libro averaĝe po 120 paĝoj. Averaĝo de beletra libro - 167 paĝoj.

### *En la konsultlibro*

Vidu ni nun kion esploris nia Marinko Gjivoje, kiu okupiĝis longdaŭre pri la Esperanta libro, kaj kiu sistemece skribis pri tiuj temoj. En sia verko "Panoramo de Esperanta literaturo", Zagreb, 1979, li asertas sur la paĝo 197 ke "la Esperanta literaturo konsistas ĝis nun el pli ol 15.000 titoloj". En la libro "Konsultlibro pri Esperantaj bibliotekoj kaj muzeoj", Zagreb, 1980, Marinko Gjivoje sciigas ke la kolekto de la plej granda Esperanta biblioteko en la mondo, la Biblioteko de BEA (Brita Esperantista Asocio) "Butler Library" konsistas el 30.000 eroj (libroj, broŝuroj, jarkolektoj k.s.). De tio Esperantaj libroj estas 11.000, Esperantaj gazetoj kaj periodaĵoj 1.240 volumoj de 359 titoloj. Por la biblioteko en la Chaux-de-Fonds Gjivoje skribis: pli ol 10.000 bibliografi-aj unuoj (36 metroj de bretlongo).

"SAT adresaro" (1983-1984) paĝo XXI sciigas ke an la urba biblioteko en La Chaux-de-Fonds troviĝas ĉirkaŭ 10.000 verkoj pri aŭ en internacia lingvo.

### *200 libroj jare*

Komparante la ciferoj el cititaj verkoj kun la asertoj pri 40.000 aŭ 50.000 Esperantaj librotitoloj, oni nepre ekpensu ke, ekzemple, Marinko Gjivoje ne estis eble ĝisdatigita kun siaj indikoj. Oni ekpensas ke post la jaro 1980 la Esperanta libroeldonado ekfloris kaj ke oni de tiam ĉiujare eldonas pli rapide pli multe da libroj. Sed, se ni legus, ekzemple, la artikolon "Ses centroj de la Esperanta kulturo" publikita en la jaro 1981 en la novembro numero de "esperanto", oficiala organo de UEA, ni trovos sur la paĝo 187 ke la muzeo IEMW en Vieno posedas 17.900 volumoj, kaj la Biblioteko Bulter (BEA) 11.000 libroj, 1.000 binditaj volumoj de gazetoj. Do, nenio nova! Por la Urba biblioteko de La Chaux-de-Fonds oni mencias



"milojn da libroj, revuoj, leteroj, fotoj kaj kongres-raportoj en aŭ pri Esperanto".

En la lastaj jaroj oni eldonas averaĝe 200 libroj jare: 1981 - 149 titoloj, 1982 - 233 titoloj, 1983 - 220 titoloj kaj en la jaro 1984 de januaro ĝis oktobro - 155 titoloj de novaj Esperantaj libroj (laŭ la rubriko "Laste aperis..." en "esperanto" de UEA).

Mi kredas ke ĉi tie menciindas la opinion pri la Esperantaj libroj de unu tre grava persono, nome la opinion de d-ro István Szerdahelyi. En "Kajeroj" 13, marto 1967, paĝo 9, li skribis: "Ni ne povas tro fieri kun la statistiko de nia libroeldona rikolto inter I 1954 kaj V 1961." Tiu periodo de sep jaroj kaj duono estis tre malriĉa je Esperanta eldonado: nur 30 libroj po jaro! Mizere kaj preskaŭ katastrofe, ĉar - kiel diras d-ro Szerdahelyi - la Esperanto-movado estas ekskluzive internacia, kaj la libro tiurilate estas ege grava, ege necesa.

### *Centro de la kulturo*

Inter "ses centroj de la Esperanta kulturo" (kaj tiuj ses estas: IEMW Vieno, Biblioteko BEA Londono, Bulgara nacia biblioteko, Sofio, Biblioteko Hodler Rotterdam, Urba biblioteko La Chaux-de-Fonds kaj Aŭstralia Nacia Esperanto-biblioteko) neniu centro troviĝas en Jugoslavio. Tamen, mi kredas ke oni devus envicigi inter la plej grandaj centroj de la Esperanta kulturo ankaŭ la plej grandan Esperantan bibliotekon en Jugoslavio, la bibliotekon de Marinko Gjivoje, donitan al la Universitata biblioteko en Zagreb. Tiu biblioteko konsistas el 5.500 libroj kaj broŝuroj kaj de 200 jarkolektoj de re revuoj kaj gazetoj (53 metroj de bretlongo). Ĝi enhavas eble la plej grandan kolekton de Esperantaj vortaroj. Edward Ockey kune kun Marinko Gjivoje elnombris 896 Esperantaj diversspecaj vortaroj.

Ĉu dek, aŭ dudek, aŭ kvardek, kvardek, aŭ -finfine - kvindek mil titoloj de Esperantaj publikaĵoj estas multe, aŭ malmulte? En la oceano de libroj, ekzistantaj en la tuta mondo, la Esperanta libro estas nur malgranda guto. Ĉiun jaron en la mondo oni eldonas centoj da miloj librojn. Nur en Usono oni eldonis en la jaro 1970 36.071 novaj libroj kaj la sekvintan jarojn 37.692 novajn librojn. Biblioteko "Lenjin" en Moskvo kaj Kongresa biblioteko en Washington posedas po 15 milionoj da libroj! La Universitata biblioteko en Zagreb havas 500.000 libroj kaj la Scienca biblioteko en Rijeka ĉirkaŭ 100.000. Tiom kiom entenes la biblioteko de Gjivoje nun, tiom anhavis en Parizo la katalogo de la Reĝa biblioteko en malfrua dek-sesa jarcento. UNESKO publikigis en 1952-a jaro ke sep landoj en la

mondo produktas pli ol dek mil titolojn jare (Soveta Unio, Britujo, Hindio, Japanujo, Okcidenta Germanio, Usono kaj Francujo). Ĉiujare oni tradukas el angla, rusa, franca, germana, hispana, itala kaj el aliaj lingvoj ĉirkau 30.000 libroj...

### *Eĉ guto malgranda ...*

Sed "Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan". Ĉar, kiom da libroj povas tralegi unu persono en tuta sia vivo? Se iu legas konstante ĉiun tagon po dek paĝoj dum 70 jaroj, tio estus ĉiun monaton 300 paĝoj, aŭ po du libroj 150-paĝaj, aŭ ĉiun jaron 24 libroj, aŭ ĉiun jaron 24 libroj, aŭ en 70 jaroj 1.680 libroj 150-paĝaj. Do, por la eblecoj de unuopulo la nuna Esperanta librokvanto sendube estas netralegebla.

Rado Ŝkalamera

### Tre multekostaj libroj

---

Laŭ la kurzolisto de la 8. de novembro 1984 unu guldeno nederlanda valoras 5628 malnovaj dinaroj. En la "Esperanta katalogo 1984/85" de la Libroservo de UEA ĉiuj prezoj de la libroj estas indikitaj en guldenoj.

La plej multekosta Esperanta libro estas "Plena ilustrita vortaro" (PIV) kaj ĝi kostas 129 guldenoj, aŭ 726.012 malnovaj dinaroj! "Bibliografio de Internacia Lingvo" de P. Stoĵan kostas 90 guldenoj, "Esperanto en perspektivo" 84 guldenoj, "Inĝenia hidalgo Don Quijote de la Mancha" 81 gld kaj "La Dia Komedio" 69 guldenoj.

"Plena verkaro de Zamenhof" en 9 libroj kostas 390 guldenoj! Tio estas preskaŭ 2,200.000 malnovaj dinaroj.

En "Novi list" de la 8-a. de novembro 1984. estas publikigita informo laŭ kiu averaĝa persona enspezo en la regiono Rijeka estas 24.614 novaj dinaroj, aŭ 2,461.400 malnovaj dinaroj. Komparu vi mem.

R.Ŝ.

# STUDIJ ESPERANTA NA KARDELEVOJ UNIVERZI U LJUBLJANI

## Milijokaz esperanta

**U** Ljubljani je 24. studenoga 1984. esperanto ušao u svijetnu učeničku strukturu jezika. Bez velike pompe i bez parne krunih riječi, počeo je postip- lomski studij međunarodnog jezika esperanta na Pedagoškoj akademiji Univerzita Karla. Studij će trajati četiri semestra, nakon čega se, poslije položenih ispita i diplomskog rada, stječe diploma nastavnik esperanta.

Doktor Pedagoške akademije Skofljak, prilikom otvorenja ovog studija, rekao je da je sretno što se ostvarila dobra ideja. Istaknuo je da će taj studij, osim jezičnog znanja, dati i snažnu odgojnu moć što je osobom nosi ideja međunarodnog jezika. Predstavnik Prosvjetne službe SR Slovenije Vinkler, također dugogodišnji prijatelj esperanta, podsjetio je da se u Sloveniji u nekim osnovnim školama već predaje esperanto i da će ovdje, uz pomoć post-diplomskog studija, ta nastava još više napredovati.

Ideja o potrebi takva studija esperanta javila se zato što je to društveni problem, a ne neki hobi. Govoreći o razlozima zbog kojih vrijedi uvesti esperanto u škole, dr. Zlatnar je naglasio da se učenjem međunarodnog jezika daci lakše uče druge jezike i da stječu veću sposobnost razmišljanja i jaču moć zapamćanja. Pomoću esperanta stupaju u direktan kontakt sa svjetom vršnjacima širom svijeta. U okviru UNESCO-a više je takvih kontakata ostvareno esperantom nego svim ostalim jezicima svijeta ukupno.

Na post-diplomski studij upisala su se 23 studenata. Polovica ih je iz SR Slovenije i svi su oni učitelji, koji već predaju

mir Mušić s Filozofskog fakulteta u Zagrebu, dr. István Szerdahelyi sa sveučilišta ELTE u Budimpešti, još jedan profesor s esperantološkog fakulteta budimpeštanskog sveučilišta. Nastava na studiju predaje se na esperantu. Prva predavanja su već održana.

Dr. István Szerdahelyi eminentni je esperantist, profesor primijenjene lingvističke, interlingvističke, esperantologije i metodologije stranih jezika. Sed je struke «Esperanto — jezik i književnost» na sveučilištu ELTE. Objavio je mnoga interlingvistička, esperantološka i metodološka djela. Sudjelovao je kao autor na mnogim interlingvističkim seminarima, tečajevima i predavanjima diljem Evrope.

Dr. Szerdahelyi istaknuo je suradnik Instituta kibernetičke pedagogije u Paderbornu (SRNJ). Znanstveni eksperimenti koji se tako obavljaju dokazali su, uz ostalo, da se esperanto, u prosjeku može naučiti u sedam (šak i deset) puta kraćem vremenu nego bilo koji drugi jezik. Dr. Szerdahelyi bio je na čelu trogodišnjeg eksperimena petoro susjednih zemalja (Austrija, Italija, Madarska, Bugarska i Jugoslavija), koji je poticao na inicijativu Saveza esperantista Jugoslavije i Sveučilišta u Ljubljani. Dr. Zlatnarovim sklo-

visitke. Vi ste voditelj te nastave. Studenti prošle trogodišnje studija postaju srednjoškolski profesori esperanta s državnim diplomom — prvi u svijetu. Koliko već ima takvih profesora i koja je njihova sudbina?

— Na mojem sveučilištu studij esperanta postojalo već osamdeset godina. Za to vrijeme diplomiralo je oko stotinu studenata. Oni koji su u svoje diplomirane uključeni su postali profesori i inženjeringu, koji imaju zakone pravo na svim račinama predavat materiju iz svoje struke.

● Na kojim se sveučilištima u svijetu danas može studirati esperanto?

— Velik je interesat esperantološkog pokreta što nemamo pretno vodenu statistiku, pa ne znamo točno na kojim se sveučilištima na svijetu predaje esperanto i u kojem obliku. Poudario sam da je nastava onog oblika kakav je u Budimpešti jedinstvena. Na mnogim sveučilištima pomaže tečajevi esperanta.

● Na kojim se naučnim institucijama ili vodima studira i naučno istražuje interlingvistička i esperantologija?

— Organizirana naučna istraživanja interlingvističke i esperantološke obavljaju se na našem sveučilištu, također i u Moskvi na Interinstitucijskoj Sovjetske akademije nauka, pod vodstvom doktora filozofskih nauka M. I. Kazjeva. Neorganizirano, ali već imamo dosta učenika koji daju vrlo esalnu nauku, istraživanja u najrazličitijim granama te nauke. Ali, na žalost, nedostaje statistika i koordinacije. Na našem sveučilištu, osim dr. Zlatnar

### Damir Rak studado de Esperanto en Ljubljana

Komitato de la E-societo "A.Š.Turković" decidis financi samideanon Damir Rak en la studado de Esperanto en la Pedagogia Akademio en Ljubljana. La instruado komencos la 24-an de novembro 1984. La studado daŭros du jaroj (kvar semestroj).

La instruado, resp. la prelegoj okazos ĉiam unu semajnfinojn en monato.

R.Š.

RAMO SKALANIERA

esperanto. Ostali su iz SR Hrvatske, SR Bosne i Srbije i SR Makedonije i jedan student iz Rak. Troškove studija plaćaju dvo esperantista "A. Š. jeke.

### ● SEDAM PUTA

Studij se sastoji od gramatike, književnosti, esperantologije. Predavao rimski. Osim voditelja, na Zlatnara, predavači učilišna profesora: dr. Dalibor Brozović i Filozofskog fakulteta u Zagrebu, dr. Vinkler.

Na sveučilišne nastave esperanta na Sveučilištu ELTE u Budimpešti, u okviru epće ling-

## Regiona Ŝak-ligo de Rijeka


### "ESPERANTO" TRIUMFIS

En la ĉi-jara Regiona Ŝak-ligo de Rijeka partoprenis ses kluboj de la Rijeka-regiono: Ŝkurinje, Esperanto kaj INA II el Rijeka kaj Kraljevica, Crikvenica kaj Krk. La teamoj ludis sur dekdu tabuloj kaj ĉiu konsistis el ses senioroj, kaj po du ŝakistinoj, junuloj kaj pioniroj.

Nia teamo, kiu konstante ludas en ĉi tiu ŝtupo de la ŝakkonkursoj jam ekde la 1978.j., kun variaj rezultoj, ĉifoje konkeris la unuan lokon en la fina plasmano kaj tiel atingis sian ĝisnunan plej bonan sukceson.

Tiamaniere nia kluba teamo progresis al la pli alta ŝtupo de la ŝakkonkursoj. Venontjare ĝi partoprenos la konkursojn de la Respublika Ŝakligo (Rijeka grupo) en kiu ludas la plej bonaj ŝakteamoj de la Rijeka-regiono.

Ni menciu niajn ŝakistojn kiuj realigis ĉi-tiun grandan sukceson: Milan Orešković, Nikola Musulin, Damir Domijan, Stjepan Đuretić, Slavko Markočević, Slavko Andrić, Ivan Vukas, Snježana Bokulić, Mario Grohovac, Dragan Tutek, Martin Miharija, Adrijano Seršić kaj Edi Hrzić. Niajn gratulojn!



- ŜAJNAS KE EN TIU ĈI LUDO NI ESTAS NUR PEONOJ.

Jen la fina plasmano: ESPERANTO 36, Krk 35, Kraljevica 32, Ŝkurinje 30,5, INA II 25 kaj Crikvenica 19,5 poentoj.


S.Đ.



## DEMANDOJ

### Heliko - la nomo, jes aŭ ne?

Pri tio kiel ekestis la nomo de la gazeto kiun vi nun tenas en la manoj oni povas legi en la unua numero de "Heliko". La nua numero aperis en februaro 1981. Kristina Markov kiel "viceurednik" skribis tiam sub la titolo "Zdravo geruljo" interalie: "Zaŝto "Heliko"? "Polako pa (ne)sigurno!". Ustvari nakon maratonskog lupanja gluposti (po običaju "dvoglasno, tj. većinski smo se složili da se list zove "Steleto". Ali... Nakon 100 godina, upadne u klub naša Sanja i spomene puža (nakon što smo je pitali za mišljenje i prijedlog). "Tako je!!!" - dreknem ja iz petnih



**-RIGARDU, ĈARLI, TION ONI NOMIĜAS,  
„LA PERSONO DE LA TITOLPAĜO”**

pli ol tri jaroj kaj duono. Estimata samideanino el Zagreb Lucija Borčić alte taksis la lastan numeron de "Heliko", sed ŝi demandis kial la nomo "Heliko", se la gazeto havas tiom malmulte da helikeco, se ŝi estas malhelikeca.

Jes, heliko sinonimas malrapidecon kaj eble malprogreson. Heliko estas lanta, maldiligenta en la movo. Heliko multe salivas, salivumas, bavas. Heliko estas mukoplenta. Heliko estas fermita en sia domo, apartigita de la nuda mondo. Asociaĵoj nebelaj, preskaŭ aĉaj kaj fiaj. Sed, tamen nia mara heliko, nia litorino malgranda estas malgraŭ ĉiu - simpatia estaĵo. Kaj la nomo estas jam aparta nocio de la gazeto el Rijeka lante trapenetranta en la Esperantan mondon. Eblas ankaŭ diversaj opinioj.

žila, ponovo se složimo većinski i time je kumovanje bilo završeno. Iskreno reĉeno, nije ni meni jasno kako je došlo do realizacije lista. O tome se priĉa već godinu dana pa ništa. No, to sve dokazuje da su sve esperantske ideje u početku zelene i da treba vremena da sazru, kako bi postale upotrebljive. To je bar prosto ko pasulj (ali, prije 40 g.)

Sprite kaj originale

skribis Kristina. De tiam pasis

R. Š.

## DEMANDOJ AL KEL

.....

### Kia estas la sorto de la plej granda jugoslavia Esperanto-biblioteko?

La plej granda Esperanta kultura valorajo en Jugoslavia estas sendube la biblioteko de Marinko Gjivoje, konsistanta el 5500 libroj kaj broŝuroj kaj el 200 jarkolektoj de revuoj kaj gazetoj. Marinko Gjivoje testamentis sian bibliotekon al la Nacia kaj universitata biblioteko en Zagreb. Marinko mortis la 31-an de majo 1982. Pasis jam du jaroj kaj duono. Kia estas la sorto de tiu fama librokolekto? Kie troviĝas la libroj hodiaŭ? Ĉu oni povas studcele uzi la librojn? Kiel?

---

### Kiam aperos la katalogo de la biblioteko Gjivoje?

Ĉiuj libroamantoj senpacience atendas ĉiujn novaĵojn rilatantajn librojn. Kvankam libroj estas multekostaj kaj malfacile atingeblaj, ĉiu vera Esperantisto ĉiam montras vivan intereson por la Esperanta libro, por ĉiu esperantaĵo, ĉar la presajoj, la publikaĵoj en Esperanto signifas apartan internacian kulturon kaj ties ĉarmon.

Se oni ne havas monon por aĉeti novajn librojn, ekzistas almenaŭ ebleco prunti la librojn el bibliotekoj. Sed, antaŭ ĉio oni devas scii kie troviĝas kio, respektive kio oni povas havigi. Tial ĉiu bona biblioteko disponas kaj disponigas la katalogon, aŭ katalogojn.

Kiam aperos la katalogo de la biblioteko Gjivoje? Tia katalogo aŭ bibliografio estus valora kaj inda dokumento. Ĉu oni trovos necesan monon por kompili kaj poste multoblighi tiun verkon. De kiu aŭ de kio dependas iu pozitiva rezulto?

R. Ŝkalamera

## ANTAŬ 75 JAROJ

# Istria Esperantisto

## en Pariza revuo

"La Revuo" internacia monata literatura gazeto kun la konstanta kunlaborado de dro L.L. Zamenhof, aŭtoro de la lingvo Esperanto, en la numero de Marto 1909. publikigis sur la paĝoj 317 kaj 318 artikolon sub la titolo "Silvio Strahimiro Kranjĉević". La unua frazo de tiu artikolo teksas jene:

"Kranjĉević, kiu mortis la 29. de Oktobro, estas sendube la plej granda kaj plej originala poeto kroata."

Kvar monatoj post la morto de kroata poeto la pariza revuo en Esperanto skribis belan artikolon. Kaj tio okazis antaŭ 75 jaroj. "La Revuo" estis tiam la plej bona Esperanta periodaĵo. Eldonisto de "La Revuo" estis la granda franca librejo Hachette en Parizo. La redakcio de "La Revuo" konsistis el ĉi tiuj famkonataj Esperantistoj: ĉefa kunlaboranto dro Lazaro Ludoviko Zamenhof, direktoro Carlo Bourlet, administracia sekretario Félicien de Ménil, redakcia sekretario Horace Huet, redaktoroj: Camille Aymonier, Raoul Bricard, René de Lajarte, dro Leono Zamenhof. "La Revuo" havis tiam korespondantoj el 22 landoj: Bohemujo, Danujo, Alĝerio, Aŭstrujo, Anglujo, Belgujo, Brazilio, Bulgarujo, Ĉilio, Germanujo, Grekujo, Hispanujo, Italujo, Japanujo, Litovujo, Polujo, Rusujo, Svedujo, Svisujo, Tunisio, Turkujo, Unuigitaj Ŝtatoj. Inter ili troviĝis tre famkonataj nomoj; pioniroj kaj veteranoj de la Esperanta movado: Teodor Ĉejka, Oreškov, Luis Sepulveda, Marie Hankel, Isao Saito, A. Dombrovski, dro Kazimierz Bein, I. Ostrovski, Edmond Privat...

En tiu bela societo ni povas menci i unu nomon el nia regiono, unu nomon el Istrio. Nome, la aŭtoro de la artikolo pri Kranjĉević estas Metodio Brajŝa. Metodio Brajŝa naskiĝis en Pazin (en la koro de Istrio) en la jaro 1889, kaj li mortis en Triesto en la jaro 1910. Li vivis nur 21 jaroj. Por nia Esperantista movado en regiono Rijeka la nomo de Metodio Brajŝa signifas multon. Li fariĝis Esperantisto almenaŭ jam en la jaro 1908, kaj verŝajne ankaŭ pli frue. Tio signifas ke Esperanton oni bone konis en tiu tempo ne nur en Rijeka, sed ankaŭ en Istrio.



Sur la bildo: Metodio Brajša



# HELIKO

TRIMONATA GAZETO DE LA KOMUNUMA ESPERANTO ORGANIZAĴO RIJEKA

LA 3-a JARO - NUMERO 8 k 9 - JUNIO k AŬGUSTO, 1984.

## HELIKO PRUVAS SIAN MALHELIKECON

Unuafoje mi havas enmane "Helikon", organon de la E-organizaĵo Rijeka. Antaŭ la eklego malagrable trafis min la fakto ke la akompana letero estas skribita kroatlingve. Mi kutimiĝis al uzado de Esperanto inter esperantistoj.

Eklegita, la gazeto kaptis min kaj mi tralegis ĝin unuspire.

Brave! La gazeto - varkita naci-lingve kaj aliparte esperantlingve - ampleksas vastan temaron

pri la regiona kaj aliregionaj agadoj, lernantaj impresoj, historiaj eroj kaj prihistoriaj kaj prilingvaj polemikoj, okazaĵoj, reagoj, humoro. La temoj kaj la redaktado -indas la respublikan kaj landan nivelojn.

Mia tre pozitiva kaj entuziasma impresoj estus eble eĉ pli granda, se mi ne estus devigata al kelkaj rimarkoj: Kial kroatlingvaj poemoj en Esperanta gazeto, se ili ne estas esperantigitaj aŭ la teksto ne havas ion komunan kun la internacia lingvo? La impreson iom malbonigas (tamen ne multaj) gramatikaj nekorektaĵoj kaj 2-3 lingvaj strangaĵoj (kunfrateca, celdirektiĝo, senrigarde k.s.)

Tre bonvenas trafaj ilustraĵoj. Sed kaj ili kaj la enhavo multe pli impresus en periodaĵo revu-aspekta.

Kial la nomo "Heliko" al la organo de malhelikeca Esperanto-organizaĵo?

Lucija Borčić



## Radio-Zagreb, Esp.-elsendo

HELIKO, trimonata gazeto de la komunuma esperanto-organizaĵo el Rijeka, aperigis sian dunumeron 8-9. Ĝi estas stencilita, kartonkovrila, ornamita per stiligita imago pri heliko. Inter la jugoslaviaj publikaĵoj ĝi estas la plej multe ilustrita kaj la plej multpaĝa, la aktuala numero ampleksas 38. La dulingva enhavo estas varia kun rimarkebla intenco esti senpera, ne seke protokola, sed proksima al la leganto. Multaj diverstipaj ilustraĵoj tre vivigas la tekstojn. La redaktoro de tiu vigla gazeto estas Damir Rak, sed la enhavon stampas per siaj pluraj kontribuaĵoj la emerita ĵurnalisto el Rijeka, inklina al historiaj esploroj, Radoslav Škalamera. La lastaj 4 paĝoj kovritaj estas nur per desegnaĵoj kun nur ioma teksto, plejparte nacilingva. La aŭtoro, aŭ aŭtoroj, de tiuj desegnaĵoj kaj foto-kopiaĵoj, ne estas klare signitaj. La dorsa kovrilpaĝo mesaĝas du pensojn en la nacia lingvo: "Esperanto kaj junularo" kaj "Esperanto-kontribuanto al la paco".

E. Lapenna

Al est. redakcio de la gazeto "HELIKO" Rijeka

Dankon, vian letereton mi ricevis kaj aldone vi trovos la tekston de hieraŭ elsendita observo pri via gazeto "Heliko No 9/84". La teksto estas mallonga, sufiĉe seka, sed radio-fakte ĝisflanka redaktoro volas ke la tekstoj estu en tiu stilo. Certe, se radio-elsendoj por esperantistoj estu miaj, mi verkus aliajn tekstojn por observo, sed ili estas nek miaj, nek entute de esperantistoj, sed de Radio-Zagreb, kiu rajtas al siaj postuloj.

Iom mi jam skribis en mia observo mi nur aldonas, ke mi ne vidas sencon aperigi nacilingvajn poemojn, sen esperanta traduko. Nacilingvaj informoj kaj mesaĝoj estas alia afero, ili estas turnitaj al komencantoj kaj tiuj multaj membroj de niaj societoj, kiuj entute ne scias Esperanton, sed poemojn aperigi nacilingve kial, se ne nur kontentigi aŭtorojn de tiuj poemoj, esperante ke eble foje ili povus fariĝi esperantistoj. En nomo de tiaj esperoj ni esperantistoj pretas fari ĉion. Kompreneble, aperigo de nacilingva poezio, nenion malutilas al la enhavo de via gazeto. Daŭrigu per via pozitiva laboro.

31-an VII.'984.

Tre kore





**esperanto**

**RAĐNIČKE NOVINE**

Broj 33 - 6. VIII 1984.



**KO, KOME,  
ZAŠTO  
I KAKO...**

# Ponosni na prijeratnu tradiciju

## NEPARDONEBLA MANKO

Impona estas la kvanto da informoj pri Esperanto, kolektita dum dek monatoj en la rubriko "Esperanto" en la semajna gazeto "radničke novine", organo de la Sindikatoj en SR Kroatio. La rubrikon redaktas Judita Rey-Hudaček. Dum la monato oktobro la rubriko ne aperadis. Eble ĉar Judita forestis. (Oni scias ke Judita partoprenis al Balkan kongreson en Ateno.)

Intenco de ĉi tiu artikolo ne estas laŭdi "Radničke novine", nek doni iun kompleksan opinion pri la rubriko "Esperanto" entute, sed nur eluzi okazon diri du-tri vortojn pri la artikolo publikigita en la rubriko "Esperanto" la 6-an de aŭgusto ĉijare. Temas pri la artikolo: Vremena prvih koraka, PONOSNI NA PRIJERATNU TRADICIJU subskribita de Marinka Đaković.



En la artikolo, ampleksanta duonon da paĝo, nek unu vorto pri la laborista Esperantista movado en Hrvatsko primorje kaj en Gorski kotar. Nen unu vorto pri Esperantistoj laboristoj kaj iliaj societoj en Delnice, en Sušak, pri Esperantistoj en Lokve Fužine, Grižane kaj Bribir.

Ovako živa esperantista aktivnost nije u međuratnoj Hrvatskoj zabilježena samo u Zagrebu i u Vukovaru. Uostalom održani jugoslavenski radnički kongresi. Šesti kongres održan je u Beogradu. Na njemu su sudjelovali delegati iz cijele zemlje. Predstavnici radnika - esperantista iskoristili su beogradski skup i održali Zemaljsku konferenciju radničkih esperantskih društava. Četrdeset radnika iz Celja, Maribora, Zagreba, Beograda, Kragujevca, Vinkovaca, Šapca, Novog Sa-

**„Esperanto kao kulturna tekovina može da igra važnu revolucionarnu ulogu. Prije svega kao internacionalni jezik on treba da pridonese razvijanju i jačanju internacionalizma među radnicima“.**

*da... govorilo je o radničkom klasnom*

Unu intertitolo de la menciita artikolo tekstas ĉi tiel: "Zaboravljene aktivisti". Verdire, forgesitaj aktivuloj! Almenaŭ laboristo Esperantisto, antaŭmilita Esperantisto kaj komunisto, kaj poste popola heroo Tomo Strizić el Bribir, kaj Ivanka Trohar, lernantino, SKOJ-membrino kaj popola heroino el Fužine estas menciindaj.

Ellasita estas la tuta Esperanta societo el Delnice, fondita antaŭ 51 jaro. En artikolo oni menciis nek la nomon de la fondinto de la E-societo en Delnice Josip Kezele, pensiita fervojlaboristo. Li fondis la societon la 8-an de novembro en la jaro 1933. Lia nuna adreso en Zagreb estas Savski gaj I/11. Nepardonebla manko.


Rado Skalamera

Tokia Universitato

Cijare ĉ. 40 junuloj ekstudis Esperanton en la Universitato Wakō, Tokio, kadre de kurso titolita "Internacia komunikado kaj lingvo". Instruas ĉiusemajne I. Takasugi kaj N. Senda. Intertempe, la universitata biblioteko akiris pli ol 2.000 Esperanto-libtojn. (El HdE)

R.Š.





autor:

IVAN ŽLIBAR

HORIZONTALA: 1. Proksime, 10. Manlibro, 13. Bazoj, 20. Surfista, 21. Virina nomo, 23. Du literoj, 24. Una prefikso, 25. Eŭropa galerio de sescento (maljunaj), 26. Du senaj literoj, 27. Nomo, 29. Unu besto, 35. Una adverbulo, 35. Pisi, 36. Ĉevalo por ĉevalkonkuro, 37. Skribu-ŝtalo, 38. nomo de Daŭlas, 39. Du literoj, 40. Du literoj, 41. Una korelativo, 42. Du literoj, 43. Tio (Yug), 44. Akuta, 46. Patrio (kaj for.), 47. Nomo de Anders, 50. Organizaĵo de Unuigintaj Nacioj, 51. Du literoj, 53. Riddigo, 56. Una jar. sezono, 57. Du senaj literoj, 58. Ekpenso.

VERTIKALA: 1. Efektivisti, 2. Neŝoca, 3. Bezonajo por dormado, 4. Du literoj, 5. Ekpenso, 6. Nomo de Ce Fungo, 7. Du literoj, 8. Pesa sento, 9. Una konjunkcio, 10. Voto de koke, 11. Du literoj, 12. Teksto por pagi, 13. Piato, 14. Una interteksto, 15. Pundo (Yug), 16. Postuloj, 17. Du literoj, 19. Kruele, 22. Skolano, 22. Sovaĝa besto, 28. Una refleksiiva pronomo, 29. Palaco, 30. Du literoj, 31. Du literoj, 32. Sed (komparativa), 34. Du literoj, 36. Du literoj, 38. Preĝejo, 42. Unu numero, 45. Hipokrite, 48. Salo (Yug), 49. Aktivo (nem. for.), 51. Du literoj, 52. Una konjunkcio, 54. Du literoj.

Mi estas ordinara

Pardonu min,

Ĉar mi estas ordinara fraŭlino

Kiun vi povas renkonti

En malnova pantalone

Malgaĉo en ĉia koro estas

Okuloj plenej kun amo

Kaj simila al mil aliaj

Pardonu min,

Ordinara knabino kun 16 jaroj

En momento ĝaja,

Feliĉa, fiara,

Po ĉio ordinara

Sed tiel, multe,

Multe

Neordinara


K.D.

Ĉi-tiun poemon sendis al "Heliko" Ĵunulino el Visoko (Bosnio). Bedaŭrinde ŝi ne subskribis la poemon per tuta nomo kaj antaŭnomo, sed nur per inicialoj K.D.

# auto škola CENTAR



## "A" KATEGORIJA



**UVJETI:**

- treba imati navršenih 15 godina

**NASTAVA:**

- 30 sati teoretske nastave

- 5 sati vožnje na vlastitom

motociklu (minimalno 50 ccm)

**PLAĆANJE:**

- cjelokupan iznos

## "B" KATEGORIJA



**UVJETI:**

- treba imati navršenih 17 godina

**NASTAVA:**

- 30 sati teoretske nastave u poslije-  
podnevnim satima (2 X 45 minuta.)

- 30 sati vožnje u dogovoru s  
instruktorom vožnje

RI-587-080

**PLAĆANJE:**

- gotovinom u dvije rate

- kredit od 4 do 12 mjeseci  
(preko roditelja)

ISKORISTITE  
KREDIT  
MINIMUM

